





ENHAVO:

julio - 1998 - N° 20-a
ASTURIO

- 2...Nia Regiono
- 3...Niaj Pensoj
- 4...La Aventuro; de Cardin
- 5...Bezono de la Internacia Lingvo tra la Historio
- 6...Mozajko
- 7...Armitaj Poemoj
- 8...Blanka Elefanto
- 9...Mesaĝoj
- 10..Kie estas la Printempo ?
- 11..Legendo pri la lago "Sorĉita Knabino"
- 12..Estos Esper'
- 13..Fisio kaj Fisisto .
- 14..En la Arbaroj
- 15..Amuzaĵoj
- 16..Astura Kanto



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



Asturio. Mapo

NIA REGIONO

OVIEDO

Estraro de ANTAŬEN

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino : M^a Luisa Menéndez

Kasisto : Celestino Fernández

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

i

Gekomitatanoj:

M^o José Alvarez Faedo

Luis González

i

David Menéndez

Eva González

Gene Álvarez

Lisa Ejarque

M^a Isabel Murillo

Daise Murillo

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILÉS (Asturias)

Tfn^o. 98. 554 11 27

Subvenciita per la Registaro de la

Avilesa Municipo

Oviedo estas la ĉefurbo de la Principado de Asturio; ĝi estas geografia politik-administra centro de la radiaj komunikoj kun la provinco. Je 28 km. De la marbordo tra la ,aŭtovojo, kaj je 440 km. de Madrido.

En Oviedo loĝas preskaŭ 190.000 loĝantojn sur movita terpeco kaj surprigante urba skizo por esti aljuĝigita kie stagnas la proksimecoj de la monto Naranĥo kaj de la diversaj montetoj, kiuj ĉirkaŭas la urban perimetron.

Je la jaro 761 kiam benediktana monaĥo fondis monaĥejon honore al sankto Vincento, kaj Fruela I, kvara astura reĝo, ordonis konstrui apude, palacon kaj preĝejon.

Alfonso II, kiu atingis la registraron je la jaro 792, translokis la kortegon al Oviedo konvertante la naskiĝantan urbon en la ĉefurbo de la regno. Enirante je la deka jarcento la landlimoj de la Rekonkero konsilas instali la ĉefurbon en Leon. Do, en la nuna Oviedo oni povas rememori la median atmosferon de la tiama urbo ekde ĝia palaca lulilo por poste amuziĝi en la moderna pura kaj zorgita ĉefurbo, kiu malgraŭ ĝia malgranda perimetro, subtenas kosmopolitan aeron ĉiam ŝirmita per la sprita nobla kaj kulta klimato, kiu ekde ĝia elekto, kiel reĝa sidejo, Alfonso II sciis ĝin doni.

La Redakcio.-



NIAJ PENSOJ...

Ĉiam, tra la paŝo de la tempo, nia avilesa urbo distingiĝis en ĉiuj la belartaj kaj sciencaj fakoj . Multe da artistoj- poetoj, pentristoj, verkistoj, rakontistoj, k.t.p.-pligrandigis kaj laŭdis la nomon de Avilés en ĉiuj la facetoj de tiu-ĉi urbeto situanta en la norda parto de nia lando.

Legante la verkojn de niaj praloĝantoj ni, ĉiuj, fieras pri la disvolvitaĵoj laboroj realigitaj per tiel noblaj avilesanoj, kiuj tiom da prestiĝo kaj brilo donis al nia mara urbo. Pro tio, ni ĉiam rememoros kaj gratulos al la menciitaj artistoj kiuj, pasintan tempon, atingis por Avilés, la splendoran nomon de astura Ateno.

Antaŭ kelkaj jaroj grupeto de avilesanoj komencis, kun vera iluzio, la lernadon de Esperanto. Ili havis tre laŭdindan ideon en siaj pensoj. Kial? Ili laborus kaj laborus por atingi sufiĉe da scipovoj, kiuj permesus al ili la korespondadon kun geesperantistoj de aliaj landoj.

Tiamaniere ili povus disvastigi la nomon de Avilés kun vera sekureco kaj admirado. Ĉu ili sukcesis?...Jes, aktuale, tra la vojo de l'Esperanto, ili amikiĝis kun multe da personoj, kiuj loĝas en la diversaj partoj de la mondo. Ekde Siberio, Australio, Japanio k.t.p. ili ricevis leterojn, kiuj ofertas al ili, grandajn animojn pro la eldonado de la revuo ANTAŬEN, disdonita per la t.m. kaj pro la emo kiun la grupanoj manifestas favore al la disvolvado de E.-o. Ĉiuj la eksterlandaj letergeamikoj amas multe al Avilés dank'al la korespondado, kiujn ili subtenas reciproke unuj kaj aliaj.




Pro tio, la geesperantistoj el tiu-ĉi grupo pensas ke ili, en io kontribuis al la pligrandigo de la avilesa urbo, kaj tio, por ili, estas sufiĉe.

Vivu la Esperanto!

Vivu Avilés!

M^a Luisa Menéndez

LA AVENTURO DE CARDIN



Kie la
“Diañu burlón”
(*) faras plian
domaĝon estas en
la havenurboj,
inter la malfeliĉaj
fiŝkaptiuloj. De
tempo al tempo, li
promenas sur la
maro kun

maŝkaptiloj. Kiam li rigardas bargon, li ĵetas la maŝkaptilojn kaj li kaptas la tutan fiŝadon.. Por la malfeliĉaj fiŝkaptiuloj nenion restas kaj kvankam ili ne rigardas al la “Diañu”, ili insultas lin.

Iun nokton Cardin eliras al la kapto de la kongro. Li ĵetis la ilaron kaj sidiĝis al la atendado. Li ne sentis paŝon, nek rumoron ĉe li, kaj tamen li aŭdis: -Ĉu mordas ili? Ĉu ili mordas?

Li timiĝis sed komprenante, ke la “Diañu” estis kiu faris la demandon, li respondis: malmulte! malmulte!.

La maristo, malbonhumora diris al li: lasu al mi trankvila.!

La “Diañu” puŝis al la maristo kaj ĵetis lin al la maro...Kiel Cardin naĝis bone, li povis sukcesi de la akvo.

Kiam Cardin aperis, la “Diañu” en la okazo, jam ne estis...

Ludoviko

Lernanto

(*) Diañu burlon- karakterizo el la Diablo en la astura mita mondo.



BEZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO (Daŭrigo)

IV

Je 1641, J. A. Comenius, ripetis ke "... la mondo bezonas komunan lingvon, pli facila ol ciuj la jam konataj...". La deklivo de la Latina lingvo kiel internacia lingvo estis ekvidita post la Traktato de Westfalia. Tiu-ĉi progresia perdo de internacia superregado de la Latina lingvo instigis, inter la filozofoj, la deziregon por sugesti la bezonon de la ekzisteco de internacia lingvo. Tiel, en vortoj de F. M. Voltaire:

Ekde la regnado de Aŭgusto ĝis proksimume la tempoj de Atila, de Clodwing, de Gondebaŭd, dum dek jarcentoj... la konata tero havis solan lingvon: oni parolis la Latinan lingvon ekde Eŭfrates ĝis la monto Atlas... Hodiaŭ, Bergama homo (de Bergamo, Italio), kiu vojaĝas tra la malgrandaj Svislandaj kantonoj, de kiuj li estas nur separita de monteto, bezonas interpreton, same kiel se li estis en Cinio. Tiu-ĉi estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo.

Kaj C. Montesquieu asertis la vortojn de lia kamarado dirante, je 1728 ke: "La komunikado inter la popoloj estas tiel granda, ke ili havas la plenan bezonon de komuna lingvo." Tamen, liaj voĉoj resonis en surdaj oreloj, kaj, la Franca lingvo, je la komenco de la XVII^a jarcento, komencis esti uzita por la internaciaj rilatoj.

La Franca lingvo havis tiel privilegian situacion, ke la aliaj statoj konsideris neceze preni antaŭzorgojn por eviti ke tiu praktiko de la Franca lingvo devenus rajton. La lasta Akto de la Kongreso de Vieno je la 9^a de Junio de 1815, skribita en la Franca lingvo, signalis, malimplicite, je la 120^a artikolo, ke la uzo de la Franca lingvo ne povis esti konsiderita kiel perforta precedenco; kaj ĉiu Stato havis la rajton por uzi, en ĝiaj diplomataj rilatoj, la lingvon kion ili uzis ĝis tiam, aŭ tia kia ili volus uzi.

Tiu-ĉi decido estis aplaŭdita de numeraj homoj de leteroj, inter ili C. Fourier, kiu, en lia verko "Théorie de L'Unité Universelle" (1841-43) li diras:


La rilatoj inter la popoloj atingos tiel rangon kaj aktivecon ke, sencese, ili prenos liajn radikojn kaj lingvistikajn cirkaŭfrazojn iuj el la aliaj; ĉiu loka lingvo versos en la generala lingvo la tutan originalon kaj la energion kiuj ĝi havas... donante siajn plej valorajn elementojn al la lingvo de la unueco, kiu ne estus la Franca, de primitiva strukturo, sed riĉa kaj belega lingvo, la unua inda de unuigita homaro, ĉar ĝi havos la genio de ĉiuj la popoloj.

María José Álvarez Faedo



MOZAIKO

La malbenita mumio




Malmulte da tempo post, ke la arkeologo Howard Carter malfermis la tombon de Tutankhamon, je 1922, mortiĝis 25 personoj rilatitaj kun la fosadoj. La mortoj de tiuj personoj estis kaŭzita pro toksaj mikroskopaj fungoj kiuj eliris de la tombo, laŭ analizoj realigitaj per la mikrobiologoj

Unu toksa arĥivo

La Welsh National Poisons Unit of Cadiff, en Gaŭlujo (U.K.) posedas bazokonitaĵon kun la nomo de 11.000 venenoj kaj ĝiaj respektivaj kontraŭvenenoj.

Arboj al la paperkorbo

Por fabriki tonelon el papero estas necese forhaki 14 arbojn de 25 metroj de alteco kaj 20 centimetroj de diametro, tiel kiel uzi 100.000 litrojn de pura akvo.



Eĥo



En la greka mitologio, Eĥo estis filino de la Aero, kaj de la Tero, kaj nimfo de la arbaroj kaj la fontoj. De tutaj la nimfoj ĝi estis la pli babilema, kaj ĝi, distris al Hera, (Juno en la greka mitologio) kiam Zeus-Jupiter iris pri amuzajo. Por puni al la babilema Hera, konvertis al ŝi en roko dirante al ŝi:

-Vi diros ĉiam la lastan vorton, tamen neniam vi povos diri la unuan.

Ŝi enamiĝis de Narciso, tamen ŝi ne povis diri nek voki al li neniam, ĉar ŝi nur povis ripeti la lastajn silabojn de la vortoj kiujn ili diris al ŝi.

Ŝi malkonsola memmortigis sin.-

Daise Murillo

Lernantino. ANTAŬEN

ARMITAJ POEMOJ

La poezio estas armilo ŝargita el vortoj. La poeto estas kiu ŝargas ĝin kaj la leganto kiu ĝin pafas, foje kiam kontraŭ si mem kaj aliaj kontraŭ la grego el danĝerbestoj kiu sturmas lin.

Blovas la vento kaj en tiu nova printempo kiu sieĝas nin, venkitaj viktimoj de la vintraj malvarmoj, alportas al ni simile renovigaj aromoj por aseki al ni ke, la forgeso estas tiel longa ke ne ekzistas neĝado, kiu kovras ĝin. Nur la amo, tiel etern.: kaj longa, povas malarmi amon kaj mallongigi forgeson.

Alportas al ni ankaŭ la vento, kiel vojaĝa poleno serĉante esperplenan fekundecon, novajn vortojn, aŭ ne tiel novajn. sed nur rejunigitajn Rajde inter efemereco de la nuna kaj la malgraveco de la estonta, la poezio, kiel la vivo mem, mortigas por revivi ĉiu momento. Pro tio ĝi longdaŭras, pro tio ĝi estas avangardo, pro tio ĝi estas eterne renovebla.

La bona apologulo de la vero renovas siajn metaforojn sen intenco de gajno kaj rezervas por si mem la lastan mensogon. Ne ekzistas nek bibliotekoj nek stilaj studadoj nek historiaj datoj nek personaj nomoj por diri ĝin, ĉenfiksigi ĝin aŭ sekvestraci ĝin.

La poezio estas viva en la strato, misvetere, tie kie la vento pliintenciĝas sur la haŭto hardita per la plorado, la ridado, la dolora vero aŭ la kruela mensogo kiu neniam povus esti pia.

La poezio enhavas nek aĝon nek identigan karton nek restadon lokon kiu ne estus la Universo kiu gastigas nin, timigas nin kaj ĉiam mirindegas nin. La deveno de la homaro estas registrita en la versoj de tutaj la poetoj. Ĉiu nova poemo estas alia tatuo fajre desegnita sur la haŭto de la homo per la malproksima fajro de iu stranga stelo. Kosma polvo kiu brulas kiel akra tranĉilo en niaj manoj. Luma semo de iu vagema dio, de nekonata hejmo en la Tero.

Ĉar ni vivas frape, ĉar apenaŭ permesas al ni diri ke, ni estas kiu estas, niaj kantoj ne povas esti sen peko ornamado. Pro tio estas armilo ŝargita el vortoj, foje kiam kontraŭ iu mem kaj aliaj kontraŭ la grego el danĝerbestoj kiu sturmas vin.

DAMEGO.-

BLANKA ELEFANTO

Kiel blankaj elefantoj estas malofta, la reĝo el Sian ordonis nutri ilin per la plej bona nutraĵo kiun la posedantoj havis.


Tiel kiam kortegano malagrabilis reĝon, ĉi tiu anoncis, “Kiel speciala korinklina provo, mi la Reĝo, donacos vin blankan elefanton”.

Tiam kortegano donacon, insulti se akceptis malriĉiĝus multekosta por la

Ofte la kortegano rapide, afero kiun la reĝo preferis.

La frazo enmetis en la okcidentaj lingvoj la vojaĝantoj kiuj devenis el tiuj landoj.


Hodiaŭ oni uzas tiun-ĉi frazon por montri ion aŭ iun kiu estas multekosta kaj kontraŭe taŭgas nenion.



se la rifuzas la estis kiel reĝon, kaj ĝin, li pro la manĝaĵo elefanto.

ekziliĝis

ESIMO



MESAĜOJ

Multe da gesamideanoj de nia grupo kune kun aliaj de nia regiono. ĉeestis al la 57^a Hispana Kongreso okazinta en Valladolid. Ĉiuj pasis tre memorindaj tagoj, precipe, la lernantinoj kiuj, unuafoje, estis partoprenantoj de tiel grava evento.

Nun, ni revas kun la ĉeesto al la 83^a U.K. okazonta en Montpelliero. Vojaĝos tien, avilesa reprezentacio apartenanta al nia grupo ANTAŬEN.

Ni daŭrigas subtenante korespondadon kun gesamideanoj el la plej diversaj partoj de la mondo. Por ni ĉiuj, reprezentas grandan ĝojon ricevi leterojn de landoj tiel malproksimaj al nia Hispanujo.

Kun la alveno de la somero niaj kursoj finis. Por celebri la adiaŭo, ĝis la venonta monato oktobro, ni kunvenis frate kaj amike en fama restoracio en kiu ni povis gustumi tipajn kaj bongustajn asturajn manĝadojn

Ankaŭ Radio Sele (106.5 f.m.) Oviedo, kiu disdonas programojn per Astura lingvo, elsendis esperantan kurseton. Je la fino ili kunvokis gesamideanoj de nia grupo kiuj konfidis krei esperantan grupon en la astura ĉefurbo Oviedo por disvastigi, dum la venontaj jaroj, la Internacian Lingvon. Oni atendas vian helpon. Skribu Apartado Correos 837. Oviedo

• *****

KORESPONDI DEZIRAS:

Juan Trenor Allen. Kun gesamideanoj de t.m. pri ĉiuj temoj.

Adreso:

La Estrecha 26.-5^o-3^a A.

33011 OVIEDO Asturias.-

KIE ESTAS LA PRINTEMPO?

(Kina Kadreva)

Ekbrilis suno. La vintro subleviis siajn kotmalpurigitajn jupojn kaj forkuris.

-Venis la Printempo!...eksusuris sur la kampo du pezaj pro humido nuboj kaj rulmovis tra la blua ĉielo.

-La Printempo? Kie estas la Printempo? -krakis per beko la Cikonio kaj ĉirkaŭ rigardis.

-Mi eksentis, ke ĝi estas veninta, sed kie ŝi sin kaŝis? ekfajfis la grileto.

-Certe ŝi kaŝis sin en la ĉerizflorojn!-elpepis la Hirundo.

-Ne! Ĝi ne estas ĉi tie! diris la Venteto. -Sajnas al mi, ke ĝi estas kuŝanta en la verda herba kampo.

-Vi eraras! ordigis sian purpuran jupon la Koksino. La tutan matenon mi serĉis ĝin en la herbo. Ah! kiom mi volas vidi la Printempon!

-En tiu tempo al la ĉerizarbo traflugis Abeleto. Ĝi vidis la violeton, kuntiĉita apud la dornohava arbustaro kaj tuj ĝi ekpensis, ke tio estas la Printempo.

Jen ĝi! Jen ĝi! -gaje eksumis la Abeleto.

La saman momenton ie tute proksime ektintis rido kaj bruparolo. Je la kampo alkuris infanoj. Ili ĵetis senzorge siajn sakojn sub la ĉerizarbo kaj ekkurludis. Unu blondahara knabino rimarkis la Cikonion kaj ekkriis:

-Vidu! Cikonio! La Printempo estas veninta!

La infanoj tuj forgesis la ludon kaj gajkrie kuris al la Cikonio.

-Printempo! Printempo! -ĝoje ili ekkantis.

La Cikonio turnis kapon al ili kaj kun respekto scivoleme okulesploris ilin.

-Evidente, ili estas la Printempo!- fiere ĝi diris. Poste svingis flugilojn, altiĝis al la suno, rondflugis dufoje sur la infanoj kaj malrapide direktis sin al la marĉejo por rakonti al la aliaj cikonioj pri la Printempo.

El la bulgara tradukis LILIJA KOLEVA
BULGARIO

LEGENDO PRI LA LAGO "SORĈITA KNABINO"

En la suda parto de Argentino, ĉe la mirinda lagoregiono de la vasta Patagonio, lokiĝas la lago "Sorĉita Knabino".

Laŭ iu antikva legendo de la praloĝantoj de tiu teritorio, la popolo pehuenĉe, tie vivis Elcha (elp. elĉa), bela princino. Ŝi estis la filino de la tribestro Naucanpanqui (elp. naŭkanpanki). Iam ŝi devis forfuĝi de sia patrio, ĉar ŝia patro venkita de la najbara tribestro Colihue (elp. kolihŭe) devis transdoni ŝin al li kiel trofeon pro lia triumfo.

Ne dezirante tian drastan ŝanĝon de sia pozicio pasante de princino al servista vivo, Elcha vizitis sorĉistinojn en la espero, ke ŝi helpos iel modifi ŝian aspekton por ne esti rekonata de Colihue.

Enviante la belecon de Elcha, la sorĉistino irigis la knabinon al la bordo de iu lago, transformis ŝin en ŝtono kaj forĵetis en la lagon, kion ŝi uzis por realigi la sorĉaĵon por tiel eviti, ke Elcha iam ajn revenu en sian antaŭan homan staton.

Dume, Cantipan, iu juna soldato, kiu longtempe amis sekrete la princinon, aŭdinte pri la forfuĝo de Elcha serĉadis ŝin ĉie. Iutage dum unu el liaj senfinaj pigradoj, li alproksimiĝis al la lago por sensojĝi post longa marŝado. Tie li malkovris, ke ĉe la akvo de la lago respeluliĝas la vizaĝo de Elcha.

La kompatinda princino rakontis la malfeliĉan viziton al la sorĉistino. Li decidis eniri la lagon por serĉi tiujn sorĉilojn, la nuraj objektoj, kiuj helpos detrui la faritan magian ŝtonon. Dum la vesperiĝo la enamiĝintan soldaton naĝante senespere en la lago serĉante vane la sorĉilojn, kiuj povus helpi la princinon esti libera de sia laga prizono.

Atilio ORELLANA ROJAS
Argentino

ESTOS ESPER'

Se la ĝardeno en kiu vi loĝas iam ne floras
Se la suno iam ne brilas en via somer'
Se la manoj subtenintaj vin ne estas
Se kritiko estas bruoj en via silent'

*Ne, ne, ne ploru kara mia
ne, ne, ne ploru kara mia.*

*Ĉar estas vivo kara mia
ĉar estas virtoj kara mia.*

Se la rido vin minacas kun foriro
se ies okulo vin rigardas kun mizer'
se la pensoj de viaj amikoj vin forgesas
se la lito estas danĝero por via rest'

*Ne, ne, ne ploru kara mia
ne, ne, ne ploru kara mia*

*Ĉar estas vivo kara mia
ĉar estas virtoj kara mia.*

Se la reago kiun vi atendis ne realiĝis
se la atento meritinda iris for'
se iu venis kaj skuis vian paciencon
kaj detruis la konkordon de via ĉiel'


*Ne, ne, ne ploru kara mia
ne, ne, ne ploru kara mia*

*Ĉar estas vivo kara mia
ĉar estas virtoj kara mia.*

Kiam la oftaj vizitantoj plu ne venos
kiam la mateno anstataŭ luma estas malhel'
kiam la respondo de via spegulo ne estos promesita
kiam la kandelo de via koro fariĝas rev'


*Ne, ne, ne ploru kara mia
ne, ne, ne ploru kara mia*

*Ĉar estas vivo kara mia
kaj se estas vivo, estos esper'.*



Julián Hernández

Kubo



Fiŝo kaj fiŝisto

Taj estis la plej ludema fiŝeto de la rivero. Ĝi multe amuziĝis serĉante la hokojn de la fiŝistoj, kiujn ĝi tre bone konis, por pendigi sur ili malplenajn skatolojn, malnovajn botojn kaj rubaĵojn. La fiŝistoj ricevis grandajn surprizojn.

Iun tagon Taj promenis kun siaj amikoj preta moki la fiŝistojn. Tial do, rimarkinte hokon, ĝi pendigis sur ĝi amason da algoj kaj naĝis al la supraĵo de la rivero por vidi kian mienon faros la fiŝisto. Kiam Taj revenis al siaj kompanoj, ĝi estis tre malgaja.

—Li estas kompatinda maljunulo misnutrita kaj senŝua.

Taj estis tre bonkora. Ĝi serĉis en la fundo de la rivero sufiĉe bonan paron da piedvestoj. Trovinte uzeblan paron da botoj, ĝi alkroĉis ilin al la hoko de la almozulo, kaj denove naĝis al la akvo-surfaco por ĝui la gajecon de la fiŝisto.

Tamen —pensis la fiŝeto— ĉi viro ankoraŭ malsatas.

Kiam la hoko alfundiĝis denove, Taj aliris ĝin.

—Mi ekprenis decidon —diris Taj al siaj amikoj—, mi estos la nutraĵo de la kompatinda maljunulo.

Vane ĝiaj amikoj klopodis persvadi ĝin. Kiam la fiŝisto tiris la kanon, li gaje eksaltis antaŭ la belega fiŝo ĵus kaptita.

La loĝantaro de la rivero sciigis pri la sindonemo de Taj. Ĉiuj fiŝoj ploris kortuŝitaj rememorante la sinoferon de la ludema amiko, kiu lasis sin kapti.

El la libro "La ballena jugetona" tradukis Miĉjo Drako Bona

EN LA ARBAROJ

Gerard de Nerval 1831”

Printempo, la birdo naskiĝas kaj kantas
Ĉu vi jam aŭdis ĝian voĉon?
Ĝi estas dolĉa, simpla, kaj kortuŝanta,
la birdo voĉo.....en la arbaroj.

Somerè, la birdo birdinon serĉas
Ĝi amas kaj amas nur unu foje.
Kia dolĉa, paca kaj fidela ĝi estas!
la nesto de la birdo.....en la arbaroj.

Poste, kiam venas aŭtuno nebula
ĝi silentas antaŭ la malvarma vetero
Ve! Ĝia devas esti felica
la morto de la birdo en la arbaroj.

Trad: Odette Scheidel

(FRANCIO)



Amuzajoj

CISIMO



Viro prezentigas ĉe la serviga oficejo por enspezi la senlaborulan monkompenson

- Kia estas via metio? oni demandas lin.
- Ĉasisto.
- Ĉu leporoj, kolomboj?
- Ne. De rabobestoj: leonoj, tigroj, ktp...
- Fulmotondro! kaj kie?
- En la Aviles-a municipo.
- Sed ... Ne estas tiaj rabobestoj en ĉi tiu municipo!
- Pro tio mi estas senlaborulo ...

Santiago Mulas - Hispanio

La filo de mafio-estro hejmenvenis el la lernejo kaj la patro demandis:

- Kiel vi sukcesis en la ekzameno?
- Bonege. Tre multon ili demandis, sed mi silentis kiel muro, asertis la filo.

Silvia Hamalainen - Finnlando



- Mi kun edzino estis feliĉaj dum dudek jaroj!
- Kaj kio okazis poste?
- Ni renkontiĝis ...

Ivan Varjuhin - Rusio

TROMPIS SIN MEM

- Ĉu la estro akceptas?
- Kompreneble! Por tiel belaj virinoj nia estro ciam havas tempon!
- Bone! Tiam, diru al li, ke sercas lin lia edzino!

Lilija Koleva - Bulgario



Instruisto: "La skribo de via hejma tasko tre similas al tiu de via patro".

Knabo: "Jes: mi skribis ĝin per lia plumo".

Patricia Harkin - Australio

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena nº 26 - 1º D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA

NE MI EN OVIED' EDZIĜOS


(En Oviedo no me caso)

Allegretto


GIRALDILLA




Ne mi en O - vied' ed - zi - ĝos, kaj pri Ĥi-



ĥon!..mi ja du-bas! Mi kons-tru-i - gos pa - la - con



post la pre-ĝe - jo de Tru-bia. Ne min a - ten - du Ka - ru-



lin' mi - a. Mi lo - ĝas fo - re, ki - el vi sci - as

TEXTO ASTURLIANO

En Oviedo no me caso,
y en Gijón lo pongo en duda.
Tengo de hacer un palacio
xunto a la iglesia de Trubia.

La mió morena
que no me aguarde,
que vivo lejos
y llégo tarde.

ESPERANTA TEKSTO

Ne mi en Ovied' edziĝos,
kaj pri Ĥiĥon!..mi ja dubas!
Mi konstruigos palacon
post la preĝejo de Trubia. (1)

Ne min atendu
karulin' mia.
Mi loĝas fore
kiel vi scias.

(1) Elp. Trubja